N. N. 29,

Bela tag'

tradukita de Joachim Gießner

Belegan tagon ĝuis ni,
ho, kia rara grac'!
Nur ĝojon puran donis ĝi,
senzorga amdonac'.

Kun jubilado de l'alaŭd'
vekiĝis la maten'.
Orumis poete ĝin la sun',
la tagon en seren'.

Belega tag' en harmoni'
pli lumas ol juvel'.
Radias, vokas: tiu tag'
vin gvidu al ĉiel'!

Kaj kia sorto trafos vin,
se venos zorg' kaj plag',
por ĉiam restos la memor'
je nia bela tag'.

Sed krom memoro tiu tag'
ja estas multe pli:
Ĉar helpu ĝia varma am'
dum ĉiu temp' al vi.

Traduko de la Germana poemo "Ein schöner Tag" de N. N. 29 en Esperanton de Joachim Giessner *(∗1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-615-1236 (2012-10-17 16:21:57)

Tiu ĉi traduko troviĝas en la poem- kaj kanto-kolekto `http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html`*. La teksto estas kantebla laŭ jena melodio:* `http://www.mamas-truhe.de/lieder/ein-schoner-tag-ward-uns-beschert.html`*.*